.

& Vintra fabelo:

< Rekante 23 el 47 batoj por strofo, entute 282 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Nikolao Hohlov (La tajdo, 1928). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<1,7:47> (/rere rere mire rere rere rere dore mimi; rere rere mido do; rere rere mire dodo rere rere mido dodo; rere rere mire mi;

(#Rekantaĵo: dodo doododo mire dodo; rere rere dore mimi; dodo dodo mire dodo; dodo doododo mire dodo; rere rere dore mimi; mimi re e)

)×6)+

(& Strofoj:

'1 /Sur la sledo, svelta sledo, post amuza kabaredo, ; Kun tintila sonorad' ; Ni veturas -- aventuras, la ĉevaloj fluge kuras ; Sub la stela miriad'.

(×: **Gaje dancas amato mia ; vigle kun la ĉarmo sia. ; Ĉu ne ridas ankaŭ via? ; Gaje dancas amato mia ; vigle kun la ĉarmo sia ; en la ĉen'**.)

'2 En sereno de l' ebeno malaperas la fadeno ; De la glata vintra voj' ... ; Mia Nita -- am' subita, de la frost' ebriigita ; Alpremiĝas en la ĝoj'. .....

'3 En fabelo kaj sen celo rotacias karuselo ; De la sentoj en la kor', ; Hej, rapide kaj senbride flugi ien, flugi fide ; Kun favoro de Amor'! .....

'4 Hej, ĉevaloj, hufaj ŝtaloj, kiel rido de cimbaloj ; Por dancanta ciganin', ; Uraganu, akompanu, dolĉe tiklu, ĝutiranu ; Per freneza takto nin! .....

'5 Brila neĝo -- vintra reĝo -- ĉion tenas en sieĝo, ; Gaje ĉirpas en la knar', ; La survoja vento ĝoja en malklara gam' hoboja ; Vokas, logas al kampar'. .....

'6 Unu suno -- unu juno ... la unua febra kuno ; Kaj magia stelpoem' ... ; Mia Nita, am' subita, de la frosto rozkisita ; Ĉion kronas per alprem'! .....)